

La laborprogramo de Kultura Centro Esperantista
Claude Gacond, 324-a radioprelego, 1969.12.24 & 27

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

En septembro ni raportis pri la kreo en Svislando de Kultura Centro Esperantista. Tiam ni legis al vi erojn el alvoko, kiu estis dissendita al la svisa esperantistaro.

A.- Pluraj geaŭdantoj esprimis la deziron esti regule informataj pri la progresoj kaj laboro de tiu Centro. Pro tio ni nin permesos raportiri pri la Ĝenerala Jara Kunveno, kiu okazis en Biel-Bienne je la 16-a de novembro. Ĉeestis 38 partoprenantoj, inter ili reprezentantoj de 9 esperantistaj societoj.

Cl.- La provizora Centra Komitato raportis pri la laboro efektivigita. Ĝi konstatis, ke ĝi plenumis la labor-programon, kiu estis al ĝi fiksita. Post eldono de *Detala protokolo* pri la unua kunveno, ĝi dissendis demandaron al la esperantistaj societoj por pretigi la dissendon de alvoko. Ĉiuj societoj, escepte de unu, tuj alportis sian moralan kaj eĉ aktivan apogon al la dissendo de tiu alvoko.

A.- La prezidanto povis konstati, ke la svisaj esperantistoj vigle apogas la kreon de Kultura Centro Esperantista. En du monatoj la donacoj sumis je 6'245 svisaj frankoj.

Cl.- Tiu pozitiva reago de la esperantistoj kuraĝigis la provizoran Centran Komitaton proponi labor-programon por la periodo 1969 – novembro 1970. Kreo de konstanta sekretario estis oficiale decidita. Sed ĉar la donacoj de la esperantistoj ne sufiĉas por garantii la financadon de tiu sekretario, estis decidite alvokadi al la neesperantistaj rondoj. Tiu alvokado estas la ĉefa tasko de Kultura Centro Esperantista por tiu labor-periodo.

A.- Kulturaj agadoj povos esti programitaj, nur kiam oni estos certa pri la ekzisto-povo de tiu Centro.

Cl.- Jen ni legas al vi kelkajn erojn el la Unua Labor-programo de Kultura Centro Esperantista, kiun la ĉeestantoj unuanime akceptis.

A.- El la antaŭparolo ni citas :

Cl.- « *La statuto, kiun ni akceptis la pasintan jaron, devigas la provizoran Centran Komitaton prezenti labor-programon. Tiel vi ne plu elektos gvidantojn, sen ekzakte koni iliajn intencojn.* [...] »

A.- *En la labor-kunsidoj de Kultura Centro Esperantista oni ne plu diskutos pri la principoj, sed pri la metodoj efektivigi tiujn principojn. La principojn ni decidu unufoje en la jaro okaze de la Ĝenerala Jara Kunveno.*

Cl.- *Ni devas ĉesi nin lasi gvidi de la eventoj. Ni devas ĉesi postkuri la okazaĵojn. Se ni volas, ke esperanto estu foje oficialigita en la kultura vivo de nia lando, ni devas ekinflui la eventojn, ni devas provi antaŭkuri la okazaĵojn, ni devas iniciati.*

A.- *Tiu laborprogramo [...] devas fariĝi ilo, kiu nin helpas kunlabori. Ĝis nun ni tro ofte estis diletantoj, kiuj dise kaj subjektive entreprenis ne planitajn agadojn. Poste ni interdisputis, ĉar la rezultoj montriĝas senesperigaj. Tiu labor-programo helpu nin pli racie, pli objekte, pli unuece planadi kaj gvidi nian laboron. »*

Cl.- Ni iom longe citis el la antaŭparolo, ĉar por Svislando la akcepto de labor-programo antaŭ ol elekti komitatanojn, kiuj respondecos pri ĝia efektivigado, estas io tute nova. Tiu komitato nun troviĝas antaŭ kompleksa tasko, kies elementoj ne povas esti teorie antaŭviditaj. Jen kion antaŭvidas tiu labor-programo :

La laborprogramo de Kultura Centro Esperantista
Claude Gacond, 324-a radioprelego, 1969.12.24 & 27

A.- « Ni neniam povos progresi, se grupoj stagnas kaj se niaj tutsvisaj societoj duonkrizas. Helpe de la membroj [...] de la Kultura Komisiono, kiuj estas delegitoj de la esperantistaj societoj [...], ni esperas povi atentege ekzameni la malfacilaĵojn renkontatajn de la lokaj grupoj kaj trovi vojon por interesigi la grupojn al nia ĝenerala agado. Tiucele ni unue faros enketon per demandoj. La rezultojn de tiu enketo ni publikigos en **Svisa Espero**. Ili permesos hierarkii la necesajn agadojn laŭ iliaj urĝoj kaj ĝeneraligita bezono [...] »

Cl.- Tiam sekvas listo de agadoj, kiuj havas intereson ĉefe por svisoj. Poste la labor-programo tuŝas la ĉefan problemon, kiu estas la alvokado al la ne-esperantistaj rondo. Mi ree citas :

A.- « Tiu alvokado povos okazi nur post bona planado. Ni devas eviti kaŭzi negativajn reagojn. Ni devas dediĉi grandan atenton al la ĝenerala informado pri esperanto.

Cl.- En la libro-vendejoj nepre devos troviĝi lernolibroj pri esperanto. Sen tio niaj informaj laboroj estos vanaj. Ni jam ekkontaktis tiurilate unu firm-estron. [...]

A.- Ni devos okupiĝi pri la informado de la ĵurnalistoj, kaj ne nur de la gazet-redakcioj.

Cl.- Ni devos aranĝi ĵurnalistajn inform-prelegojn.

A.- Ni devos informadi la radion kaj la televidon.

Cl.- Ni devos redakti ĝeneralan raporton pri niaj agadoj kaj celoj por la ne-esperantista publiko, kiun ni povos disdoni dum tiuj informaj kunvenoj.

A.- Ni devos pretigi dokumentajn tekojn por disdonado al la industriistoj, kies fincan helpon ni petos.

Cl.- Ni devos organizi la regulan nutradon de priesperantaj rubrikoj en simpatiantaj gazetoj.

A.- Ni devos starigi patronan komitaton, kies rolo estos aŭspicii niajn agadojn. »

Cl.- Tiu laborprogramo poste registras la kulturajn agadojn, kiuj estas atendataj. Sed ĝi avertas, ke planado de tiuj agadoj povos okazi, nur post kompleta firmigo de la financado de Kultura Centro Esperantista.

A.- Tiuj kulturaj manifestacioj estas :

Cl.- « Prelegoj pri esperanto en ne-esperantistaj kulturaj movadoj.

A.- Kursoj de esperanto por komencantoj, progresantoj kaj kandidatoj al la Supera Diploma.

Cl.- Kursoj en esperanto pri ne-esperantaj temoj.

A.- Arango de semajnfinoj : migraj semajnfinoj, kontaktaj semajnfinoj, studrondoj, labor-rondoj. [...]

Cl.- Ferio-seminarioj.

A.- Reorganizo de la Ekzamena Komitato de Svisa Esperanto-Societo en la celo starigi tutsvisan Ekzamenan Komisionon, kies aŭtoritato estu agnoskata en la lernejoj medioj.

Cl.- Starigo de prilingva konsilantaro, kiu estus je la servo de la esperantistoj, kiuj havas prilingvajn demandojn. »

A.- Por fini jen kelkaj eroj el la konkludo :

Cl.- « La pozitiva reago de la esperantistaro al nia alvoko, pri kiu ni estas dankemaj, ne devas nin iluzii. Ni nek devas esti tro optimistaj, nek sisteme pesimistaj. Antaŭ nia septembra alvoko, ni ne sciis, ĉu la esperantistoj estas pretaj finance kontribui al la starigo de Centro

La laborprogramo de Kulura Centro Esperantista
Claude Gacond, 324-a radioprelego, 1969.12.24 & 27

vere kapabla ilin reprezenti kaj oficialigi esperanton. Nun ni scias, ke ni povas kalkuli pri la helpo de la esperantistoj.

A.- Antaŭ koni la reagon de la industriistoj, komercistoj, metiistoj, al nia alvoko, ni evitu ĉian tro rapidan konkludon. Ni konsciu, ke ju pli ni disvastigos esperanton, des pli la kontraŭstaro al esperanto kreskos. Kaj ni ne scias, kiujn formojn prenos tiu kontraŭstaro. Pro tio ni estu tre realistaj, tre singardemaj. Ni detalege programu niajn agadojn. Ni asekuru nian defendon.

Cl.- Se vi deziras ricevi tiun labor-programon de Kulura Centro Esperantista, skribu al Radio-Svislando.

A.- Okaze de la finjaraj festoj, ni esprimas al niaj geaŭdantoj feliĉajn finjarajn tagojn.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-